

Internacia Fervojisto

Dumonata organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF)
kaj fervojfaka revuo



ISSN 1397-4270

2018.4

La reloj ligas la landojn – Esperanto la popolojn



Karaj gelegantoj,

okdek ok paĝojn ampleksas la Eŭropa Datumprotekta Bazreglamento, okdek ok paĝojn en plej origina administracia ĵargono. Neniu tralaboras ion tian volonte por eltrovi la esencon.

Sekvante la diskutojn ĉi-temajn ĉe ni en Germanio mi gajnas la impreson, ke tamen tio necesus, ĉar la regularo estas valida kaj ankoraŭ la opinioj diferencas, kion ĝi signifas por kiu. Ekscititaj speciale estas la asocioj, ĉu registritaj aŭ ne, kiuj unuflanke vivas de la honorofica laboro, aliflanke vidas sin minacataj de konsiderindaj monpunoj en kazo de malobeo.


Ne helpas traserĉi la reton. Kiel kutime ĝi servas kiel forumo por publikigi ion ajn sen garantio pri vero kaj ĝusto. La demando ekzemple pri la kondiĉoj por la uzo de la membrodatumoj arbitre estas respondata jen per „oni ja libervole donis la informojn”, jen per „informo sufiĉas”, jen per „nepre skriba konsento bezonata”.

Ne ĉiu amatora futbalklubo kaj ne ĉiu popoldanca grupo havas juriston je dispono, kiu pretas senkoste doni fidindajn respondojn.

Ili turnas sin al la landaj unuiĝoj aŭ tegmentaj organizoj kaj tie petas pri konsiloj kaj aŭdas resume, ke oni okupiĝas pri la problemoj.

En simila situacio troviĝas IFEF kaj ĝiaj landaj asocioj: La afero ankoraŭ daŭras. Sed mi kuraĝas anonci, ke en la sekvonta eldono de nia gazeto ni dediĉos spacon al tiu temo – espereble kun rezulto prezentebla.

Amikajn salutojn



Guido Brandenburg

Enhavo:

Karaj gelegantoj	62
Enhavo, presindikoj	63
Senspire en Vroclavo – taglibro el la 70-a IFK.....	64
Protokolo pri la publika komitatkunsido dum la 70-a IFK.....	75
Ĉio en la nuboj	87

Titolpaĝo: La tramvojo estas nerezignebla trafikilo en Vroclavo
(Foto: Skelenard, WikiMedia), vd. paĝon 64

Internacia Fervojisto

Dumonata fervojfaka revuo en Esperanto kaj organo de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

Apero: Januaro, Marto, Majo, Julio, Septembro, Novembro

Redaktofino: La 10-a de la antaŭa monato

Estraro de IFEF

Prezidantino: Rodica Todor (Rumanio) rodica_todor@yahoo.com

Sekretario: Vito Tornillo (Italio) vitorni@virgilio.it

Kasisto: Laurent Vignaud (Francio) laurent@ifef.net

Redaktoro: Guido Brandenburg (Germanio) guido.brandenburg@t-online.de

Gvidanto de la Faka Komisiono: Jan Niemann (Danio) niemann@kabelmail.dk

Membroj de la Redaktora Komisiono

Lene Niemann (Danio), Jean Ripoche (Francio), István Gulyás (Hungario)

Membroj de la Faka Komisiono

Ladislav Kovář (Ĉeĥa Respubliko)

Bank-Konto:

Nomo: „Laurent Vignaud”

IBAN: FR33 20041 0 1011 0929 374Y 03237

BIC: PSSTFRPPNTE

UEA-konto: iffk-o

Retejo: www.ifef.net

Facebook: <https://www.facebook.com/pages/IFEF-Internacia-Fervojista-Esperanto-Federacio/726039834155372>



Ni ankoraŭ kolektiĝas – kongresanoj sub la brilanta postaĵo de l'skermisto

Senspire en Vroclavo - taglibro el la 70-a IFK

Sabato: Kun horo da malfruo mi atingas la hotelon. La konekto en *Poznan* atendis kvin minutojn mian prokrastitan trajnon de Berlino. Sed mi bezonis pli ol kvin minutojn por kompreni, ke la stacio de *Poznan* estas dividita en du partojn kaj la kajo kvin ne estas en tiu, en kiu mi alvenis. Kaj do ...

Mia hotelo situas vid-al-vide de la stacidomo. Daŭras nur minutojn por registriĝi, trovi la ĉambron, ŝovi la kofron en angulon kaj alveni en la subtegmenta salono, kie la interkona vespero jam estas komencinta. Dum Teresa gvidas la konferencon mi silente mansvingas kaj ridetas al konataj vizaĝoj. Prezentas sin la ĉeestantaj nacioj - malmultaj germanoj, mi refoje konstatas, probable pro la konkurenca german-franc-luksemburga kongreso en *Zweibrücken*.

Kio okazos, kio ne okazos. Anonco sekvas post anonco. En salonofono mi enviciĝas por komuniki mian alvenon. Ĵus mi intencas kun la verda



Ankoraŭ kelkaj instrukcioj de Teresa


kotonsako plena de broŝuroj, prospektoj kaj donacetoj rapidi al la ĉambro, kiam mi duonorele aŭdas Teresa paroli pri la plua vespero: „Kiu volas viziti la multmedian fontanon povas iri per tramo linio 2 ĝis *Hala Stulecia* aŭ per tramo 5 ĝis *Galeria Dominikańska* kaj tiam per 10, aŭ per 9 ĝis *Piastowska* kaj tiam per 1. Ekiro estas hal-

tejo *Dworzec Główny* sur la alia stratflanko. Ni renkontiĝos post kvaronhoro antaŭ la enirejo“. Ŝi aldonas ankoraŭ informojn pri tarifoj kaj funkcio de biletaŭtomatoj kaj ke super-70-jaruloj veturas senpage – principe, ĉar ne sufiĉas legitimilo, sed necesas pollingva atestilo.

La unuajn du fojojn mi vojaĝas trompe, dubante ke estas iu, kiu okupiĝas pri la biletoj. Mi suspektas ke mi ne estas la sola.

Ĉirkaŭ la malhela fontana lageto apud la „Halo de Centjariĝo“ instalis sin kermeso kun budoj vendantaj lumobjektojn por ŝvebigi ilin en la aero, porti en la mano aŭ uzi kiel ĉapelojn. Antaŭ komenco de la prezento sur la tereno jam okazas festo de lampiroj.

Subite aperas malseka piroteknikaĵo, danco de lumo, akvo kaj koloroj laŭ muziko jen ekscita, jen trankvila, klasika, moderna, eble dudek minutojn, kaj malaperas subite kiel ĝi estas veninta. Ĉu jam?



Dancantaj lumradioj – la multmedia fontano

Mi klopodas ne perdiĝi kaj sekvi rekonitajn kongresanojn, trovas la haltejon kaj retraminte al la hotelo falas en la liton.

Dimanĉo: La universitaton mi ankoraŭ ne estas trovinta sur la urbomapo kaj denove delegas la elekton de la ĝusta tramo al la plimulto. Sed ĉifoje mi havas bileton.

En brilanta sunlumo – kiu akompanos nin dum preskaŭ la tuta kongreso – ni promenas laŭ unu el la multaj Odro-branĉoj, post kelkcent metroj turnas nin maldekstren kaj staras antaŭ helflava, riĉe ornamita konstruaĵo de la universitato.



La rektoro de la universitato vekas la tricent jarojn aĝan orgenon en „Oratorium Marianum“ kaj surprizas nin per Bach-fantazioj.

La interno spiras tradicion kaj dignecon. Murtabulo festas komponistojn kaj muzikistojn ligitajn al la universitato. Najbara pordo kondukas en riĉe ornamitan baroksalonon. La „Maria-Oratorio“ estas rezervita por muzik-eventoj kaj specialaj solenaĵoj. Des pli granda la honoro, ke tie okazu la oficiala malfermo de nia kongreso. Mi modeste eksidas ĉe la gazetara tablo kaj admiras pentraĵojn, figurojn kaj ornamaĵojn kiuj kreas tiun specialan atmosferon. Sur la podio mi laŭ bildo

en la kongresbroŝuro rekonas la rektoron de la universitato. Lia saluto atestas sinceran simpatian al nia komuna lingvo kaj la ideo malantaŭ ĝi. Pliajn salutojn nome de instancoj, asocioj, delegacioj mi aŭskultas rutine kaj ĝojas pri la muzikaj intermezoj prezentitaj per gitaro kaj violono.

Ĉu spontanea ideo aŭ parto de la koreografio: La rektoro leviĝas kaj malfermas la pordojn de ŝranko malantaŭ la podio malkovrante orgenon, tiras kaj premas kelkajn registrobutonojn, sidigas sin antaŭ la klavaro kaj kun evidenta plezuro ludas por ni kelkajn Bach-fantaziojn - per instrumento 300 jarojn aĝa kiel la universitato, ni aŭdas poste.

Antaŭ mallonga programpaŭzo por foti kaj fotiĝi Rodica dankas la meritplenajn kongrespreparintojn. La kunveno likvidiĝas kaj strebas al la mo-

numento de la skermisto, kies nuda postaĵo formas konvenan fonon por la kongresana bildo.

Ree de tagmanĝo ni kolektiĝas samloke kaj aŭskultas la gvidanton de la traurba promeno, kiu klarigas al ni la kialon de la nudeco: alkoholo kaj



Dum la pordo estas fermita, la koboldo povas dormi.

ludemo. La junulo perdis siajn vestaĵojn al kunstudentoj, kiuj lasis al li nur la spadon. Scivola pri pliaj legendoj mi sekvas la grupon tra *Jatki*, strateto kun trabfakaj domofrontonoj, evidente malnova. Je la komenco staras diversaj brutbestoj, bronzaĵaj, brilantaj ĉar ĉiu preteriranto evidente sentas la deziron karesi aŭ rajdi ilin.

Ĉirkaŭ ili ne estas plektita legendo. Ili nur memorigas pri la sorto de fruaj kolegoj kiuj perdis sian vivon en la strato de buĉistoj.

Ankaŭ ĉirkaŭ la bronzaĵaj koboldoj renkonteblaj en ĉiuj ajn vivsituaĵoj apud la vojo – drinkantaj, prelegantaj, gardantaj pordojn en la subgrundon, estingantaj fajrojn, grim pantaj sur lanternomastojn, ankaŭ ĉirkaŭ ili ne estas trikitaj legendoj. Ili estas la nepoj de tiuj ŝajne naivaj gnomoj, kiuj tridek jarojn antaŭe ridindigis la reĝimon. Hodiaŭ ili prioritare estas ĉarmaj turismaj propagandistoj.

Ni ĉirkaŭas la historian urbdomon sur la granda foira placo. La fama bierkelo *Piwnica Świdnicka* estas fermita ĉar la mastroj ŝuldas monon al la urbo - ankaŭ tio ne legendo. Sur la ponto inter la du turoj de la Magdalena-



La sorto de la malriĉa svatiĝanto .

preĝejo en alto de 45 metroj promenas la animoj de la malĉastaj virinoj. La leono antaŭ la ĉefpordego de la katedralo ne havas harojn, ĉar la skulptisto ilin forprenis por adapti la figuron al la ricevita honorario. La

malriĉa svatiĝanto kiu malakceptita de la knabinpatro decidis fariĝi rabisto. La ŝtonbulo sur la pordoarko apud la Egidius-preĝejo estas la lasta de la knedlikoj, kiujn regule kuiris la forpasinta edzino por konsoli sian malgajan edzon - tamen kun la restriktio lasi ĉiam la lastan en la pelvo, kio funkciis ĝis iam la apetito estis tro granda. Tiuj estas legendoj.

La ŝtrumpetoj vaporas, reen al hotelo. Necesas surmeti novajn, vespermanĝi kaj preni la tramon numero 2 por atingi la teatron. Mi decidis unu lastan fojon batali kontraŭ la aŭtomato kaj estas nun fiera posedanto de bileto por la tuta semajno.

La teatro „Impart“ de ekstere impresas kiel iom polvumita hotelo. Interne ĝi estas plen-ekipita kultura centro kun du scenejoj kaj muzikklubo kaj ofertas vastan programon muzikan, teatran, kabaredan – bona societo por ni esperantistoj. Atendas nin vojaĝo tra la silezia folkloro kun malgrandaj orkestroj, ĥoroj kaj dancgrupoj en gajaj kostumoj. Kvankam multaj kantoj revekas vilaĝan pasintecon, kelkaj ne estas perdintaj sian aktualecon: „Do restas laŭ senc', ke libera la pens'“.



Kantoj kaj dancoj el Malsupra Silezio - knabinoj de la grupo „Legnica“

Lundo: Vokas la IFEF-laboro: unua – nepublika - komitatkunsido, ŝanĝoj en kongresa regularo, postokaza aprobo de honorigoj, nova ĉefkomitatano, venontaj kongresoj, eksteraj rilatoj. Detalojn protokolas Vito. Faka komisiono, terminaraj decidoj, demisio de terminara sekretario, strategiaj ŝanĝoj en UIC. Detalojn protokolas Jan.

Alfred Schubert estas sendependa ĵurnalisto. Pri liaj sugestoj rilate efikan kunlaboron kun redakcioj mi estis scivola jam antaŭe. Mi diligente uzas la kunportitan kajeron kaj notas multajn klarigojn principe evidentajn sed tamen novajn.

Necesas hasti ĉar Carsten Schnathorst komencos sian koncerton kaj ni ne volas maltrafi la unuajn taktojn. La koncerto okazas en palace ornamita salono, ankaŭ kun multe da fantazio neniel imagita en stacidomo. Mi

forgesis demandi kiun funkcion ĝi havis, komence post inaŭguro de la novgotika konstruaĵo. Carsten kaj la teknikistoj ankoraŭ eksperimentas pri la elektronika piano. Tiam ĉio estas ĝuste kontaktita kaj li dancigas siajn fingrojn sur la klavoj, rakontas kaj voĉe furiozas tra la oktavoj. Ni dankas per aplaŭdo kaj (ĉu vera danko?) per kanta subteno.



Lastaj reĝisoraj intertraktoj antaŭ la koncerto de Carsten „Kaŝi” Schnathorst

Mardo: La fervojaj fakuloj devas frue ellitiĝi. La listo de prelegoj estas neatendite longa kaj la regiona trajno al *Jaworzyna Śląska* ne atendas ĝis ni estos finintaj. La medioj estas bone preparitaj. Dank’ al akurata komenco ni spektas sep el dek preparitaj kontribuoj de la fervojaj arkadoj en *Gorzów Wielkopolski* preter tramoj sur fervojaj trakoj ĝis la kabloj por la ĉina fervojo – la tuta gamo de fervojaj temoj.


Jaworzyna Śląska estas loko de lokomotiva deponejo nun servanta kiel fervoja muzeo iom fora de la stacio. La taksio estas malnova flava lerneja aŭtobuso, solida kaj fidinda. La strikta regularo apud la enira pordo ankoraŭ subtrekas la aŭtoritaton de la ŝoforo: „Estu afabla kaj ne uzu malĉastajn vortojn!”



Tendra lokomotivo estas ŝovata trans la turnplaton.

Ĉie sur la tereno staras veturiloj. Multaj lokomotivoj aspektas, kvazaŭ ili morgaŭ jam povus ekdeĵori antaŭ laŭhorara trajno. Kelkaj nur ankoraŭ servas kiel ekzemploj por klarigi principojn kaj funkciojn. Aliaj atendas dormante sur apartigitaj trakoj aŭ en la fono de la lokomotiva halo la okazon, kiam laborforto kaj mono estos je dispono por forbrosi la ruston, interŝanĝi ladojn kaj boltojn kaj redoni al la meritoplenaj veteranoj la

iaman brilon. La muzeo ŝajnas esti ankaŭ (provizora) deponejo por objektoj tro domaĝaj por forĵeti.



Translokigo de lando - vojoj de forpelitoj.

Kiu volas, rajtas kunveturi – de la haltejo „Jaworzyna Śląska – deponejo“ trans la turnoŝtationon, tra la remizo ĝis la portalgruo kaj reen.

Sur la tereno ne sole estas priservata la fervoja nostalgio. Vagono kun kesto el dikaj lignotraboj kun paftruoj memorigas pri la funkcio de la fervojo en milito, aliaj kun blanka surskribo „Deutsche Reichsbahn, Königszelt“ - la nomo de la urbo en prusa kaj germana tempo - pri forpelo kaj deportado. Mi imagas vicajn de grizvizaĝaj mizeruloj forirantaj en malcertan estonton kaj aliajn alvenantajn, siaflanke forpelitaj, dum mi

legas transportordonojn kaj listojn kun nomoj kaj permesataj objektoj.

La ekskursiva plano kondukas nin per la flava aŭtobuso reen al la stacio kaj per motorvagono al *Świdnica*, tie promene al du preĝejoj, la impona baroka katedralo Sankta Stanislavo kaj la „Kirko de la Paco“, certe tiu kun kompare unika historio. Ĝi atestas, kiujn kurbajn vojojn necesas iri por vivi sian kredon, tiukaze la luteranaj enloĝantoj transvivintaj la 30-jaran militon. La packontrakto transdonis Silezion al la katolikaj habsburganoj, kiuj nur kun restriktaj kondiĉoj koncedis al la luteranoj propran preĝejon: konstrui ĝin ekster la urbomuro kaj nur el malfirmaj materialoj.



Enirejo al la Kirko de la Paco

La verko de la vroclava arkitekto estis trabfaka konstruaĵo, halo kun spaco por sep mil personoj, kiu rezistis jam 361 jarojn – ĝis hodiaŭ.

Finfine mi lernas unu polan vorton: „*Rynek*“ en *Świdnica* same kiel en Vroclavo estas la foira placo. Ni eksidas antaŭ kafejo, trinkas kaj admiras la zorge restaŭritajn fasadojn.

Refoje per regiona trajno mi kun la ekskursantoj atingas Vroclavon, la hotelon, rigardas la fotojn kaj notas la okazaĵojn de la tago.

Merkredo: Denove IFEF-laboro. En publika komitatkunsido ni raportas pri la pasinta jaro, diskutas la atingiĝojn kaj ripete klopodas elturniĝi el la konstanta problemo havi pli da laboro ol laborfortoj. Detalojn denove protokolas Vito.

Posttagmeze atendas nin ŝipo sur Odro-rivero. Mi korektas mian imagon, ke ni veturos laŭ la diversaj branĉoj de la rivero tra la urbo. La ŝipo estas



Muziko manfarita – „NOPROBLEM“

tro granda por tiaj manovroj. Prave konkludite: Ĝi direktas sin Odro-supren, lasas la urbon malantaŭ si. La domoj cedas for de la rivera bordo kaj lasas spacon al arboj kaj herbejoj. Kie kanalo debranĉiĝas, la kapitano turnas la ŝipon kaj ni post nelonge reatingas nian forirlokon. Komencanta pluveto kaj kompreneble la anoncita ves-

permanĝo instigas nin iri en la sekan internon. Mi nescie elektis bonan lokon. Malantaŭ mia dorso oni elpakas muzikinstrumentojn kaj instalas tekstostablojn. Turni min surseĝe sufiĉas. Mallonga prezento: La grupo „NOPROBLEM“ el *Cêhio* senprobleme kaptas la atenton de la tuta ŝipanaro. Klaraj voĉoj, perfekte aranĝitaj korusoj akompanataj de gitaroj kaj kontrabaso. Mi ŝatas „manfaritan“ muzikon.

Origine mi intencis partopreni la vesperan bicikloekskurson. Sed mi preferas uzi mian trambileton por atingi la hotelon.

Ĵaŭdo: „Estu ĝustatempe antaŭ hotelo ‚Polonia‘. La aŭtobuso ne longe povas halti tie“. Grupo jam estas foririnta. Kiu restas? Ĉu ni iras en la ĝustan direkton? Kelkaj restintoj serĉante rigardas ĉirkaŭen kaj hastas en okcidentan direkton. Unuopuloj hezitas, sed jen vidiĝas konataj kapoj kaj

verdaj kotonaj sakoj. Ni estas kompletaj kiam la aŭtobuso bremsas apud ni. Ni falas en la seĝojn, babilas kaj ĝuas la rigardon tra la fenestroj. La trafiko trankviliĝas. Ni trave-
turas alterne industriajn kvar-
talojn, kampojn kaj arbarojn. Ĉirkaŭ du horojn poste ni eliras sur placo antaŭ la „Miniatura parko de monumentoj el malsupra Silezio“. Bona ideo, tiun meti al la komenco de la ekskurso. Promenante kiel gigantoj inter katedraloj kaj palacoj ni akiras superrigardon per kelkaj paŝoj kaj vidas multon, por kio unutaga rondvojaĝo ne estus sufiĉinta.



István sur la pinto de *Śnieżka*



Hodiaŭ hotelo – kastelo *Fischbach*

Aliflanke, la efikon de la konstruaĵoj, la koncepton de la ĉirkaŭantaj ĝardenoj nur eblas sperti en realeco. Silezio, post serio de militoj de Prusio aneksita provinco, nun havis la plej altajn montojn de la lando. La ĉarma valo je la piedoj de *Karkonosze*, la „Giganta Montaro“, la nebulaj pintoj vekis romantikajn revojn en nobeluloj kaj riĉuloj, kiuj elektis ĝin kiel ferian aŭ kiel daŭran loĝlokon kaj en mallonga tempo konstruigis neimageblan kvanton de kasteloj kaj palacoj. La ĝardenoj laŭ la „angla“ stilo natursimile formantaj la pejzaĝon kondukas de vidakso al vidakso kun ĉiam aliaj perspektivoj, el kiuj almenaŭ unu direktas sin al *Śnieżka*, la „Neĝkasko“, kun pli ol mil sescent metroj la plej impona pinto de la proksima montaro.

Dank' al disciplinita obo al la vizitotempoj ni sukcesas vidi la pavilonon de la geografoj von Reden, la kastelojn „*Fischbach*“ de princo Vilhelmo de Prusio, „*Erdmannshof*“ de generalo Gneisenau kaj poste la reĝoj

Frederiko Vilhelmo III. kaj Frederiko Vilhelmo IV, „Lomnitz“ de familio Mentzel, riĉaj lino-komercistoj kaj „Schildau“ de princino Luise. Antaŭ ducent jaroj la aristokratoj lasis sin veturigi en kaleŝo laŭ la aleoj por viziti siajn samrangulojn, gastis en ties ĝardenfestoj aŭ admiris iliajn novakiritajn objektojn, ĉinan vazon, novan pentraĵon aŭ balenan makzelon – ion oni devas ja kolekti.



Wojtek kun gitaro

Ni sidas ree en la aŭtobuso en direkto al Vroclavo. Pliajn palacojn ne toleras la horaro. Sed ni konas ja jam kelkajn el la miniatūra parko.

La lastan vesperon ni kunvenas en la stacidoma festsalono. Staras mikrofonoj antaŭ la seĝovicoj. Refoje la teknikistoj klopodas pri sono kaj amplifikilo. Eksidas Wojtek, kies sonorano voĉon ni jam konas de la nacia vespero. Nun li montriĝas ankaŭ gitara virtuozo kaj akompanas sin prezentante elektitajn kantojn en Esperanto – vera ĝuo bedaŭrinde limigita al kelkaj specimenoj ĉar sekvas plia kantprezento. Delegacio de la „Universitato de Tria Aĝo ĉe la Ekonomia Universitato de

Vroclavo“ tute malekonomie disdonacas pruvojn de sia talento. Grizharaj gejunuloj aŭdigas klasikajn kanzonojn kaj nekonatajn popularajn kantojn en Esperanto alterne kun hajka poezio, ĉiuj kun evidenta entuziasmo.

Leviĝas maltrankvilo. Diskutantoj staras en grupoj. Estas decidaj programŝanĝoj, konkrete la ferma solenaĵo. Ĉu ŝuldate al la etoso de la momento aŭ al striktaj flugoplanoj, ĝi okazos jam nun. Rodica skizas la evoluon de la kongreso, kunvokas la kontribuintojn de la kongreso kaj dankas al ĉiuj pro ilia senlaca laboro. La IFK-flago pendas en la fono nodita



Guantanamo – adiaŭo kun la tria-aĝuloj kaj gastoj JoMo

al la granda ekrano. La lasta indiko estas „70. Wrocław 2018“. Post komenca rezisto ĝi glitas teren kaj de Teresa kaj Wiesław estas zorge kunfaldata, dum Mariló kaj Ángel atendas por sendamaĝe transporti ĝin en siaj valizoj al Hispanio. La surskribo venontjara estos „71. Málaga 2019“.



Dankon al LKK kaj ĉiuj gehelpantoj

Vendredo: Enpakinte la kofron mi redonas la ĉambrokarton kaj adiaŭas de la konatoj. Kelkaj hastas por kapti sian trajnon hejmen. Feliĉuloj partoprenos ankoraŭ la postkongresajn tagojn kaj foriros posttagmeze.

La vrocava Esperanto-grupo gastigas la IFEF-estraron en sia kunveno por mallonga kunsido. Ni parolas pri varbiloj, estontaj strategioj, kunsidoj kaj kongresoj. Sed ankaŭ tie la pensoj jam estas vojaĝantaj. Kun pli da pakajo ol dum alveno mi promenas al la stacio, trankvile povas serĉi la ekveturan trakon kaj observi la atendantajn pasaĝerojn. La vojo estas malstreĉiga.

Jam survoje mi sondas la bildmaterialon kaj pripensas kiel konvene priskribi la travivaĵojn, eble per taglibro. Okaze mi konsultas horaron kaj poziciindikilon poŝtelefonan. Nenia kaŭzo por zorgi. Ĉio iras perfekte.



Post la kongreso estas antaŭ la kongreso.
La 71-a IFK okazos 2019 en Malago

Protokolo pri la publika komitatkunsido dum la 70-a IFEF-kongreso en Wrocław (PL) 23.05.2018



Mallongigoj: Pr = prezidanto, Vp = vicprezidanto, Sk = sekretario, Ks = kasisto,
Rd = redaktoro, e-o = estraro, Ĉk = ĉefkomitatano,
IF = Internacia Fervojisto, FK = Faka Komisiono, TS = Terminara Sekcio,
FAS = Fake Aplika Sekcio, k-o = komitato, k-ano = komitatano,
kk-ano = kromkomitatano, k-go = kolego, Hm = honora membro,
Hp = honora prezidanto, l.a. = landa(j) asocio(j).
(Landkodoj duliteraj, laŭ normo ISO 3166)

1. Malfermo, konstato de la mandatoj

La Pr-ino Rodica Todor malfermas la kunsidon, salutas kaj bonvenigas la ĉeestantojn.

Ĉeestas la estraranoj: Pr-ino Rodica TODOR (RO)
Sk Vito TORNILLO (IT)
Ks Laurent VIGNAUD (FR)
Rd Guido BRANDENBURG (DE)
FK Jan U. NIEMANN (DK)
Ĉk Jindřich TOMÍŠEK (CZ)

La Sk laŭstatute alvokas la rajtigitojn kaj listkalkulas la ĉeestantojn.

	<i>Lando</i>	<i>Kodo</i>	<i>Komitatano</i>
01	Aŭstrio	AT	Martin STUPPNIG
	Belgio	BE	Ne rajtas
	Bulgario	BG	neniu
02	Ĉeĥio	CZ	Jindřich TOMÍŠEK
03	Ĉinio	CN	Tianyi WANG
04	Danio	DK	Lene NIEMANN
05	Francio	FR	Monique GRALL
06		FR	Christian DARDENNE
07	Germanio	DE	Bodo EHRlich
08		DE	Karl BERNHARD
09	Hungario	HU	István GULYÁS
10	Italio	IT	Vito TORNILLO

	Japanio	JP	Neniu
11	Kroatio	HR	Zlatko HINŠT
	Kubo	KU	Neniu (Ne rajtas)
12	Pollando	PL	Wiesław LIBNER
13	Rumanio	RO	Florin NEGREA
	Slovenio	SI	neniu
14	Gvidanto FK	Kk-ano	Jan NIEMANN

Ĉeesto de 11 l.a. 14 komitatanoj

2. Ricevitaj mesaĝoj.

Mesaĝoj pri bondeziroj al la kongreso estis legataj dum la plenkunsido.

Mesaĝoj alvenis de Sylviane LAFARGUE, Ernst QUIETENSKY.

3. Honorigo al la mortintoj

La Sk legas la nomojn de la mortintoj, pri kiuj oni eksciis de la 69-a IFK-Colmar 2017 ĝis 70-a IFK-Wroclaw 2018. Oni honorigas ilin per unuminuta silenta starigado; ili ripozu pace.

Lando	Antaŭ-nomo	Familia nomo	Naskiĝ-dato	Morto-dato	Aĝo	Menciindaĵo
-------	------------	--------------	-------------	------------	-----	-------------

Lando	Antaŭ-nomo	Familia nomo	Naskiĝ-dato	Morto-dato	Aĝo	Menciindaĵo
Belgio	Raimond	STEENHOUT				
Francio	André	LOISEL	12.11.1920	10.04.2017	96	
Germanio	Karl-Heinz	NARTEN	01.01.1931	05.09.2016	84	
Germanio	Rosemarie	WIEGAND	08.08.1934	19.05.2017	82	
Hungario	Imre	PETHES	01.04.1930	01.01.2018	87	Estrarano de HEFA kaj Vpr HEA
Norvegio	Rolf	BERGH	10.10.1921	18.08.2017	95	Pr de NEFA
Rumanio	Marian	CONSTANTINESCU		00.02.2017		
Rumanio	Mihai	IOSIF ION		00.12.2017		
Usono	Jack	GOODHAND	07.05.1937	15.01.2018	80	FD pri fervojo ĉe UEA

4. Estraranaj raportoj

4.1. Sekretario

La Sk legas la resuman raporton. La raporto aperis en IF 2018-3. Neniu demando, nek rimarko. Unuanime aprobita.

4.2 Redaktoro

La Rd resumas la raporton kiu aperis en IF 2018-2. Grava rimarko estas la manko de kontribuajtoj de aliaj membroj de IFEF, la Rd mem devas serĉi kaj redakti fakajn artikolojn aŭ informojn rilate al IFEF. La Rd proponas redukti al 4 numeroj jare, kun eventuale pli da paĝoj laŭ bezone. Rd insiste instigas membrojn kontribui per fervojtemaj artikoloj. Rd disdonas enketilon kun temsugestoj kaj kolektas adresojn de volontuloj. Unuanime aprobita la raporto.



Publika komitatkunsido en la festsalono de la vrocłava stacidomo
(foto: Laurent Vignaud)

4.3. Kasisto

La Ks legas kaj prezentas la tabelojn de la kalkuloj kaj raporton kiuj aperis en IF 2018-2.

Unuanime aprobita.

La revizorino transdonis atestilon pri la financa kontrolo. La kalkuloj estas en ordo!

5. Buĝeto 2019, kaj kotizkonfirmo

Estas konfirmitaj la du membrotizoj: **9** eŭroj por reta sendo de la revuo, kaj **15** eŭroj por papera sendo de la revuo. Unuanime aprobita.

6. Protokoloj de la 69-a IFK Colmar (FR)

La k-anoj kaj respondeculoj de l.a. ricevis la protokolojn tuj post la kongreso, ili aperis ankaŭ en IF. Unuanime aprobitaj.

7. Raporto de la ĉefkomitatano:

La Ĉk legas la raporton. Neniu demando, nek rimarko. Unuanime aprobita.

8. Raportoj de la Faka Komisiono (FK)

8.1 Gvidanto

S-ro Jan Niemann legas la raporton kaj informas pri la apero de la FervojFaka Kajero n-ro 26, disdonata en papera versio po unu respondeculo el l.a.; reta versio estos dissendita al aliaj membroj kaj enretigita ĉe IFEF-paĝaro. La enhavo temas pri la prelegoj dum la 69-a IFEF-kongreso en Colmar.

(Protokolo de kunveno de FK estas aparte farita)

Unuanime aprobita.

Dum la kunsido de FK estis decidite starigi du laborteamojn: unua, kiu tenos kontakton al UIC kaj prizorgos tradukon en Esperanton de difinoj kaj aliaj taskoj venantaj de tie, kaj dua, kiu prizorgos korektlegadon kaj reviziadon de fervojfakaj tekstoj (por IF, El Fervoja Mondo kaj FFK).

8.2 Sekretario de la Fake Aplika Sekcio (FAS)

S-ro Ladislav Kovář legas la raporton de la Sk de FAS. Temas pri agado de Fake Aplika Sekcio kaj ties internaj aferoj:

Dum 2017 aperis 12 informiloj – EFM de s-ro Tomíšek.

En la jaro 2017 estis preparita la 26-a numero de FFK

Nunjaraj fervojaj foiroj:

Innotrans 2018 - Berlino – 18 - 21.9.2018

Czech RailDays, Ostrava - 19 - 21.06.2018

Preparado de Fakaj Prelegoj dum la ĉijara IFEF-kongreso.

Kelkaj prelegoj prezentitaj dum la pasinta kongreso estis montrataj al partoprenantoj de la jarkonferenco de ĈeFEA.

Unuanime aprobita.

8.3 Sekretario de la Terminara Sekcio (TS)

S-ro Heinz Hoffmann ne ĉeestis pro malsano, sed sendis raporton. Li informas, ke post la diskutrezultoj en Vroclavo, kompilos TeKu-n por vaste informi, sed verŝajne ĝi estos la lasta terminara laboro por li. Kun granda bedaŭro la ĉeestantoj akceptis tiun raporton. Unuanime aprobita.

8.4 Statutrevizia Komisiono:

La e-o proponas ŝanĝojn en la KR, nome je la punkto 10 de la KR kaj aldonaĵoj kiel: Modeloj de Programo de Kongreso, de Aliĝilo, de Programo de la Inaŭguro (Solena Malfermo) kaj Fermo. Unuanime aprobita.

9. Raportoj de la komisiitoj

9.1 Komitatano „A” de IFEF ĉe UEA.

La Pr-ino legas la raporton pri sia tasko kiel K-ano “A” ĉe UEA pri la jaro 2017. Dum la jaro okazis pluraj perretaj komitatkunsidoj de UEA. Ĉefe estis postenaj ŝanĝoj inter la oficistoj, kaj pro tio oni devis baloti por la elekto de nova Ĝenerala Sekretario, nova Ĝenerala Direktoro kaj pliaj du estraranoj. La lastaj du postenoj estos denove voĉdonataj en Lisbono, ĉar neniu kandidato ricevis la majoritaton.

Bedaŭrinde ŝi ne povis partopreni la UK-n en Seulo, sed IFEF estis reprezentata dum la Movada Foiro de nia Ks Laurent VIGNAUD, kunlabore kun Liba GABALDA. Li salutis nome de IFEF fine de la inaŭguro.

Ĉijaran UK-on en Lisbono nia Pr-ino partoprenos. Unuanime aprobita.

10. Resumo de la jarraportoj 2017 el la landaj asocioj

La Sk legas la raporton, ĝi aperos en nia revuo “Internacia Fervojisto”. Plendoj venas pro la fakto ke kelkaj l.a. ne raportis akurate laŭ la demandilo sendita de la Ĉk; pro tio kelkaj statistikoj ne reprezentas reale

la IFEF-situacion. Kelkaj l.a. eĉ ne sendis la raporton. Raporto unuanime aprobita.

11. Analizo pri la situacio kaj la estonto de IFEF

La ĉijara cirkulero de la Ĉk pri la jarraporto de l.a. regule estis sendita al ĉiuj l.a. Pri la demando “Konkretaj proponoj”, Ĉinio respondis per konsideroj pri kunlaborado de IFEF kun aliaj ĉinaj organizaĵoj, ĉefe por organizi komunan kongreson por doni okazon al multaj ĉinoj kiuj ŝatus partopreni internaciajn kongresojn, sed pro la kostoj kaj malproksimeco tio ne eblas. La reprezentanto de la ĉina l.a., Ĉielismo, diras ke ĈEL kaj IKEF, krom EPĈ kaj ĈRI, estas pretaj kunlabori. Ĝuste en tiu kadro IFEF kaj IKEF subskribis kunlaboran interkonsenton.

Pri kuba sekcio: post la kontakto de S-ro Francés GUIBERT dum TAKE (Tutamerika Kongreso de Esperanto) en Havano, kun ses geesperantistoj, fervojistoj el Santiago de Cuba, IFEF povos denove havi l.a. tie. Pri membrokotizo ĉijare kontribuos la DEFA-membro Erik MORTENSEN.

Pri BEFA: la asocio malfondiĝis laŭ la intenco de la Pr Lucien De Sutter, pro la manko de fervojistoj. Sed ĝis Majo ne venis oficiala dokumento pri ĝia malfondo, nur estis resendita al Rd stoko de IF kun skribaĵo ke ĉe tiu adreso ne ekzistas asocio de fervojistoj. Ni rimarkigas ke en Belgio ĉeestas pluraj membroj de IFEF, eĉ dum la kongreso estas diversaj partoprenantoj, kiuj intertempe aliĝis kiel individuaj membroj ĝis kiam estos klara la situacio pri la statuto, ĉu laŭ ĝi la Pr povas ĉesigi asocion sen voĉdono de la membroj kaj la restantaj membroj rajtas daŭrigi la agadon per la sama nomo kaj statuto. Kelkaj membroj klopodos serĉi tra la dokumentoj, ĝis nun ne disponeblaj al ili, por trovi solvon. Eventuale oni restarigos novan asocion kun aldono de amikoj de fervojo.

Pri HEFA: ankaŭ hispana/kataluna asocio sendis leteron pri malfondo de la asocio. Sed ankaŭ ĉikaze en Hispanio ĉeestas eblaj membroj, amikoj de fervojo, de IFEF. Fakte dum la esploro de organizado de la kongreso en 2019 en Malága, LKK havis rilatojn kun loka sekcio de amikoj de fervojo kun kiuj estas planotaj fervojaj ekskursoj.

Pere de Facebook, estis kontaktataj kelkaj esperantistoj el diversaj landoj, amikoj de fervojo, kvankam ne aliĝis kiel IFEF-membroj, ili estas je dispono kiel kontaktuloj por kunlaboro el propra lando.

Alia grava rendevuo por la estraro estos la FISAIC-festivalo en Wels, Aŭstrio. Tie IFEF partoprenos kun inform-budo kaj ekspozicio pri Esperanto kaj havos je dispono du horojn salonon por kunveni. Pro tio estas decidita traduki kaj printi la IFEF-informilon en aliaj lingvoj, ĉefe en la franca, la germana kaj la angla. Ĝis nun la aliĝintoj estas pli ol 800 personoj.

Diskuto pli ampleksa estas farita dum la “Movadaj aferoj”.

12. Kongresproponoj:

12.1 Elekto de la Ĉefkomitatano kaj Anstataŭanto de Ĉk.

La e-o, post pluraj esploroj inter la l.a. kaj K-o, ricevis jesan respondon por plenumi la postenon de Ĉk de nia k-go Zlatko HINŠT el Kroatio. Dum la kunsido li estas prezentata al la K-o per legado de lia biografio. La elekto estas aprobita kun 13 por kaj 1 sindeteno (dum nepublika kunsido).

Por la posteno de antataŭanta Ĉk venis propono de ĈeFEA por la kandidatiĝo de k-go Ladislav HAKL el Ĉeĥio. La propono estas prezentata al K-o kiu aprobis unuanime (dum nepublika kunsido).

La ĝisnuna Ĉk Jindřich TOMÍŠEK helpas ilin kiel sperta konsilanto.

12.2 Elekto de Gvidanto kaj Sekretarioj ene de FK

Pro la fakto ke k-go Heinz HOFFMANN ne plu povos prizorgi la rilatojn kun UIC; ne estas nova persono kiu povus anstataŭi lin; Teknika Komisiono de UIC ne estas tre agema dum lastaj tempoj; oni proponas ke respondeculoj de FK restu la Gv kaj unu Sk. La nun elektita gvidantaro de FK Gv Jan Niemann kaj (FAK) Sk Ladislav KOVÁŘ kontrolos kaj ŝanĝos necesan en FR ke ĝi kongruas kun la nova situacio – Gv kaj Sk. Unuanime aprobita.

Pri la estontaj rilatoj kun UIC, por la traduko de la difinoj, estus bone se franca aŭ germana kolego povus transpreni la taskon, ĉar la difinoj estas en la du lingvoj.

Gv de FK proponas ŝanĝon en la Regularo de FK pri la elekto de la Gv. Ĉar li estas estrarano estus konvene ke tio okazu en la sama jaro de la estrarelektio, kaj ne la antaŭan jaron. La Gv Jan NIEMANN proponas sin por ŝanĝi la punktojn de la FR.

12.3 Proponataj ŝanĝoj en la Kongresa Regularo de IFEF

La e-o proponas ŝanĝojn en la KR, nome la sekvajn punktojn de la KR kaj aldonaĵojn kiel: Plia organiza kondiĉo, modeloj de programo de kongreso, de aliĝilo, de programo de la inaŭguro (Solena Malfermo kaj Fermo).

Ŝanĝoj en KR – proponoj de Estraro:

IX. Aldono KR (KONGRESA REGULARO)

Interŝanĝi E kun D, tiel: D. Financoj; E. Oficiala programo

Por D. Financoj

10) La LKK, interkonsente kun la estraro, fiksas la **bazan kongreskotizon por la IFEF-membroj**, kiu validas ĝis 4 (kvar) monatoj antaŭ la kongreso. Post tiu dato la LKK rajtas plialtigi ĝin. Familianoj kaj junuloj aĝaj **malpli ol dudek jaroj** pagas la duonon.

Propono:

10) La LKK, interkonsente kun la estraro, fiksas la bazan kongreskotizon, kiu validas ĝis kvin monatoj antaŭ la kongreso. Post tiu dato LKK estas rajtigita plialtigi ĝin.

IFEF-membroj rajtas rabatitan kotizon. Familianoj kaj junuloj aĝaj malpli ol **tridek** jaroj pagas la duonon el la koncerna kongreskotizo.

Rimarkoj: En aliĝilo ni jam mencias junulojn ĝis 30 jaroj.

Ne estas klare en ĝisnuna aliĝilo ĉu la kotizo por familiano validas nur por familianoj de IFEF-anoj, ĉu ankaŭ por edziĝparo ne ligita kun IFEF. Unuanime aprobita (dum nepublika kunsido).

13. Rilatoj al aliaj organizoj: UEA, FISAIC, UIC, ILEI, SAT, UMEA, ISAE, TAKE - IKEF.

13.1 UEA

La rilatoj kun UEA estas tre bonaj. En 2017 la IFEF Pr-ino ne ĉeestis en UK en Seulo. Sed en la venonta UK en Lisbono ŝi reprezentos IFEF kiel

“K-ano A ĉe UEA”. Jam estas antaŭviditaj diversaj diskutendaj temoj, unu el ili daŭrigo de ŝanĝoj al UEA-statuto.

Pr-ino prezentos IFEF dum Movada Foiro kaj dum fervojista kontaktkunveno per flugfolioj kaj prezentado de la 71-a IFK kaj kelkaj prelegoj de la 70-a IFK. La lokoj jam estis menditaj.

13.2 FISAIC

Dum la jaro 2017 FISAIC havas novan Ĝeneralan Sekretarion, estas la IFEF-estrarano Jan Niemann, kiu akceptis la taskon kun subteno de IFEF. Li daŭre sendas informilojn faritajn en kvar lingvoj, unue la du oficialaj laborlingvoj, germana kaj franca, tuj poste Esperanto kaj fine la angla. Ekde la 6-a ĝis la 9-a de Septembro 2018, FISAIC okazigos Internacian Festivalon en urbo Wels en Aŭstrio. Ankaŭ IFEF anoncis partoprenon kun inform-budo kaj ekspozicio pri Esperanto, eventuale ankaŭ kun propra muzika kontribuo. Ĝi estos bona okazo por la IFEF-membroj kaj estraro kunveni tie.

La ĉijara FISAIC-ĜK okazos la 06-an ĝis la 09-a de Oktobro 2018 en la urbo Ateno (GR). Ĝin partoprenos FISAIC Sk kaj IFEF e-o Jan NIEMANN, ankaŭ reprezentante nian federacion. Grava temo de la kunveno estos la elekto de la Pr. Posteno malplena post demisio de la Pr. Guy GIERES. Kandidato al ĉi tiu posteno estas franca reprezentanto de UAICF - Philippe Rouche. Ankoraŭ ne estas propono pri tio, sed verŝajne kelkaj landoj levos denove la demandon pri angla lingvo kiel nova oficiala lingvo de FISAIC. Tiu propono supozeble havos bonan ŝanĉon, ĉar Philippe Rouche regas ĉiujn tri lingvojn (francan, germanan, anglan).

13.3 UIC

Teknika Komisiono de UIC ŝanĝis labormetodon, UIC mem ne plu havas interesojn daŭrigi en la laboro ĝis nun farita, ĉar en Eŭropo agadas CER (=Community of European Railway and Infrastructure Companies - <http://www.cer.be>), kiu decidas pri multaj kunordigoj ĉe fervojo. Ankaŭ pro tio okazis la decido de FK supre menciita. La stato de la terminaro estas ankoraŭ tiu de Novembro 2015 kun kelkaj novaj difinoj.

13.4 Rilatoj al aliaj E-organizoj

ILEI: La rilatoj bone daŭras. Dum la kongreso estas proponitaj du diversaj kursoj prizorgitaj de ILEI-membroj.

Kunlaboro venis/venos en nia laborgrupo pri instruado.

ISAE: La asocio havas novan prezidanton, Anthony Lucas, kiun la Pr. intencas kontakti en UK Lisbono por diskuti la temojn pri la estonta kunlaboro. Fakaj informoj aperas en la paĝaro de STEB, prizorgita de ISAE.

SAT: Okazas interŝanĝo de la revuoj. Nia kolego Bruno Henry estas ĝia kasisto kaj ni havas informojn freŝajn ankaŭ pere de li persone.

UMEA: La rilatoj daŭras pere de interŝanĝo de la revuoj kaj de utilaj informoj ambaŭflanke.

TAKE - IKEF: Grava kunlaboro kun la du asocioj ekestis de la pasinta jaro. La IKEF Pr. Tianyi WANG (Ĉielismo) partoprenis la IFEF-kongreson, dum ĝi la du Prezidantoj subskribis kunlaboran interkonsenton por interŝanĝi spertojn kaj konkretajn agadojn. La Pr. Tianyi WANG prelegis pri elektro-kablaj trogoj uzataj en ĉina fervojo.

13.5 El Popola Ĉinio - Heroldo de Esperanto:

Pasintan jaron alvenis petoj de kunlaborado el la du famaj revuoj. Pro manko de fortoj, neniu el IFEF-membroj prizorgis pri novaj artikoloj por sendi al ili.

14. Venontaj kongresoj

14.1 Konfirmo de invito al la 71-a IFK en 2019

Venonta IFK okazos en Hispanio, Andaluzio, en urbo Malága; la LKK konsistas el lokaj esperantistoj kiuj ne estas fervojistoj. Ĝi okazos samtempe kun jara kongreso de HEF (dum kelkaj tagoj). La LKK prezentis filmon kaj dokumentojn preparitajn kaj jam dum la kongreso havis kelkdekon de aliĝoj.

Unuanime aprobita.

14.2 Elekto de lando por la 72-a IFK en 2020

Por la jaro 2020, la ĉina reprezentanto informis pri la ebleco organizi en Ĉinio la IFEF-kongreson, sed li estas nur reprezentanto kaj ne povas certigi sen konsento de estraro de ĈFEA kaj de ĈEL, kiuj estos la ĉefaj organizantoj. Ĝi okazus samtempe kun la nacia kongreso de Esperanto kaj de IKEF. Aliaj proponoj ne venis. La e-o esploros aliajn eblecojn.

14.3 Diskuto pri pluaj eblecoj

Por la venontaj jaroj jam venis jenaj proponoj: 2021 - Ĉeĥio; 2022 - Belgio.

15. Raportoj de la laborgrupoj

Pri la agado de la laborgrupoj la diskutado okazis dum la kunveno "Movadaj Aferoj", sed pri ili oni raportas en ĉi tiu protokolo.

Laborgrupo pri eksteraj rilatoj de IFEF: pri ĝi bone zorgas nia Pr-ino. Ŝi partoprenas en diversaj esperantaj aranĝoj eksterlande kaj ŝi ne perdas la okazon paroli pri IFEF kaj kunlaborado.

Laborgrupo pri rilatoj interne de IFEF: Jindřich Tomíšek kolektis kaj starigis liston pri landaj kunvenoj, ĉu pri jaraj kunvenoj de l.a., ĉu pri fervojaj aŭ pri organizitaj kunvenoj de niaj membroj. Celo estas kunordigi ilin por ne okazigu samtempe, ĉimaniere oni povos interŝanĝi eksterlandajn gastojn kaj farigi landan kunvenon internacian. Oni proponas aperigi ĝin en IF por informi IFEF-membrojn.

Pri la informilo de IFEF, oni proponas printi ĝin en E-o por E-o kunvenoj, por informi enlande estus bone traduki ĝin en propra lingvo kun landa kontakto. Por la FISAIC-festivalo jam estas planita traduko en la francan, germanan kaj anglan.

Laborgrupo pri historio kaj arkivo de IFEF: Jan Niemann raportis iomete pri la (ne)agado de la grupo. Ĉefe li rimarkigas ke en la landaj jarraportoj ĉiuj skribas ke ili kolektas materialon por historio, sed dum lastaj jaroj neniu sendis ion al li. Li sugestas kelkajn atentigojn pri la arkivenda materialo: skani malnovajn dokumentojn kiuj povos ne plu esti legeblaj post iom da tempo; skribi en la dorso de la fotoj la nomojn de la ĉeestantoj (kaj biografion), post tempo neniu rememoros la nomojn; kolekti, kaj disponigi al laborgrupo, informojn pri landa historio dum lastaj 25 jaroj;

Kune kun la protokoloj de marta e-kunsido estis sendita al l.a. broŝuro eldonita de IFEA kun titolo "Fervojistoj Esperantistoj en Italio (de la Pioniroj al nuntempo)", ĝi povus esti ekzemplo por listigi indikojn de la landaj membroj kaj IFEF-membroj.

Laborgrupo pri informado: Ladislav Haki sendis raporteton pri la agado de la grupo en la lasta jaro. La paĝaro ifef.net estis ne ofte sed regule

nutrata per informoj, aldono de dokumentoj kaj fakaj artikoloj. La IFEF-paĝo kaj grupo ĉe Facebook estas regule provizita per fakaj kaj esperantaj informoj, ĉefe pri la kongreso, la ŝatantoj estas pli ol 638, kaj averaĝaj vizitoj estas kontentigaj. La IFEF-diskutlisto estas regule nutrata de Leopold Patek kun aldonaj de aliaj membroj ĉefe pri oficialaj informoj. Daŭra alvoko koncernas plenumi la paĝojn en Vikipedio kun priskriboj de la l.a. kaj enmeto traduko de IFEF-paĝo en la naciaj lingvoj, la Ks povus helpi pri ĝi.

Laborgrupo pri financado de projektoj: Ladislav Kovář sendis raporteton pri la agado. Post diversaj esploroj Kovář prezentis planon por efektiviĝi ĝin, ĉar estas bonaj loĝkondiĉoj en Pianoro, Bologna kaj pere de k-go Jaroslav Matuška, el Ĉeĥio, interesigi studentojn de la universitato de Padurbice. La plano enhavas almenaŭ du diversajn solvojn. En tiu senco estas agentejo Kosmo Strategio kiu povos helpi nin.

Alia propono de Slovenio estas renovigo de somerumado por gefiloj de fervojistoj.

Laborgrupo pri instruado: La agado de la laborgrupo estas nacie farita per diversaj kursoj. S-ro Marc Cuffez transprenis la respondecon de la laborgrupo. Ĉefa plano estos aranĝi retan E-kurson, en Germanio jam ekzistas kun instruisto. Alia interesa reta kurso estas en paĝaro "ikurso.net".

16. Eventualaĵoj

Dum kompilo de la resumo el la l.a.-jarraportoj vekiĝis duboj ĉu la nomoj de la indikitaj fervojaj fakdelegitoj kongruas kun tiuj en la UEA-jarlibro. La decido estas lasi la jarlibron tiusence netuŝita, sed aldoni klarigojn en la IFEF-sekcio inter la fakaj asocioj de UEA.

17. Libera diskutado

Nenio. Manke de aliaj intervenoj la Pr-ino fermas la kunsidon.

Ĉio en la nuboj ...

Stori la dataron sur la disko ĉiam pli longe daŭras. Ekfunkciigo de la komputilo jen eblas, jen ne eblas. Programoj laborantaj ĉesas funkcii. Simptomoj, kiuj avertas: Via storilo agonias, ĉu vi ĝustatempe zorgis pri kopio de la gravaj informoj?

Mi prenas zorge protektitan kompaktdiskon el la umo, sur kiun antaŭ tri jaroj mi skribis skanitajn planojn kaj konstruinstrukciojn, metas ĝin en la legilon kaj konstatas: La legado fiaskas. Mi prenas alian. Ĝi funkcias. Diferenco ne estas videbla. Sed la unue menciita forgesis sian enhavon.

Tiajn spertojn faris jam ĉiuj el ni, kiuj al kutimiĝis al komputiloj kiel rapidaj kaj diligentaj helpiloj en ĉiutaga laboro.



Hieroglifoj el supra Egiptio
(foto Aoineko, Wikimedia)

estas aliaj kaj ankaŭ la kvanto de informoj konservendaj. Se ni kredas aktualajn taksojn, la provizita scio duobliĝas ĉiu kvin- ĝis sepjare. Mi ne asertas, ke la homaro samgrade saĝiĝas, ankaŭ ne ke la scio estas vera aŭ iamaniere profitiga. Tamen - tiuj informoj ekzistas kaj povas esti gravaj ne nur por ni sed ankaŭ por niaj genepoj.



Detruita durdisko
(foto: Mschau, Wikimedia)

Parolante pri tio ni regule aŭdas la historion pri la originalaj bibliaj tekstoj post jarmiloj trovitaj sur papirusoj aŭ de la hieroglifokovritaj ŝtontabuloj en egiptaj tomboj aŭ mezamerikaj temploj.

Tiuj komentoj estas same pravaj kiel senutilaj. Neniu metisto hodiaŭ havus la tempon marteli siajn fakturojn en ŝtontabulojn. La bezonoj hodiaŭ

La sugestojn de la laborgrupo pri historio kaj arkivado en la oreloj ni konscias pri la ebla valoro de aktoj kaj leteroj, kiujn ni trovas en heredaĵoj de propraj aŭ alies gepatroj. Kaj ni ne nur pensu pri la dokumentoj de la antaŭaj generacioj. Ankaŭ se ni ne estas konvinkitaj pri la valoro de la propraj produktaĵoj. Ankaŭ ili povus esti aŭ fariĝi gravaj.



Por stoki la originalojn ofte mankas la spaco. Necesas foti ilin, skani kaj stori por konservi ilin kaj – almenaŭ samgrave – disponigi ilin al aliaj.

Sur magnetaj moldiskoj? Eble por dek jaroj. Sur durdisko? Se kontinue uzata, eble kvin jarojn. Sur kompaktdisko? Dek jarojn, se bonkvalita. Poŝto-storiloj aŭ storkartoj? Ankaŭ ili dek jarojn, maksimume. Por pli novaj

teknologioj ankoraŭ mankas spertoj. „La nubo“? La nomo konformas. Kio okazas per la datenoj konfiditaj al storservanto nur scias tiu mem. Li garantias certan kvaliton kontraŭ certa kotizo. Sed la medioj de li uzataj finfine estas la samaj, kiel tiuj, pri kiuj ni mem disponas.

Ne konsiderante la teknikan konservodaŭron, la aparatoj konstruitaj por apliko de la storomedioj malaktualiĝas kaj ne estas adapteblaj al sekvantaj komputilaj generacioj. Same malaktualiĝas la formato de la datumdosieroj. Novaj programoj postulas specifajn konvertajn modulojn por ebligi aliron.

Ankaŭ la plej bone flegita materialo devas esti kontinue

kontrolata kaj prilaborata por resti disponebla ankaŭ en estonto.

Observante la nuran kvanton: Kiu solvo sin ofertas finfine al privatuloj, eldonejoj, industrio, administracio, arkivoj estas absolute malcerta. Imageble ke iam decidus informadministrantoj pri kio de la heredaĵo valoras konservon kaj kio ne.



Storservila farmo
(foto Florian Hirzinger, WikiMedia)